Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 9 Aŭgusto 2021



# VENTO

## Veksilologia revuo en esperanto

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: cordoba@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

**ENHAVO** **Paĝo**

| | |
|---|---|
| Flagoj inversigitaj | 3 |
| Maro kaj ondoj | 7 |
| Britaj koloniaj flagoj en la Mediteranea maro | 9 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 16 |
| Birdoj en flagoj | 19 |
| Veksilologia Kuriozaĵo | 22 |
| La fotografaĵo de niaj legantoj | 23 |
| Kiel enmeti tekston en la esperanto-flagon | 24 |
| La Angulo de la blazonoj: *Dominika Respubliko* | 28 |
| Flagoj kaj Poŝtmarkoj: | |
| *Poŝtmarkoj por festi la pacon* | |
| *post la Ĉako-milito* | 30 |
| Trovu la eraron ! | 34 |
| Veksilologia Terminaro | 35 |
| Ni daŭre celas fondi la asocion VENTO | 36 |
| Kiel kunlabori kun VENTO | 38 |
| Veksilologia Humuro | 39 |


*Kovrilo: Esperanto-flago ĉe Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo (Nederlando)*
*Fina paĝo: E-flago videbla sur la afiŝo de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto.*

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentantaj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# Flagoj Inversigitaj

*José M. Rodríguez (Hispanio)*

Verŝajne temas nur pri legendo, tamen oni diras, ke iam la reĝo de Laoso, en Azio, decidis viziti vilaĝeton. La lokaj aŭtoritatuloj, antaŭ tiel altranga vizitanto, decidis flirtigi la nacian flagon, sed ili erariĝis kaj hisis la standardon inverse. Do, tiuj tri elefantoj aperantaj sur la tuko aperis inverse.




Flago de la Reĝlando Laoso inter la jaroj 1952 kaj 1975



Flago montrata al la reĝo okaze de moŝta vizito

Tio kolerigis la reĝon, li eĉ pensis, ke tiu fiago estis insulto kontraŭ tiuj diaj bestoj. Do, li promesis ŝanĝi la flagon de Laoso, laŭ formo kie ne ekzistus diferencoj ĉu la flago estis ĝuste aŭ inverse hisita.




Flago de Laoso depost la jaro 1975

Kiel dirite, temas pri bela rakonto, pro la fakto, ke verdire Laoso ŝanĝis sian flagon, de tiu tradicia de la 3 elefantoj al tiu nuntempa post la jaro 1975, kiam tie popola respubliko anstataŭis la monarkian sistemon.

Ĉi historio eble starigas demandon, kion signifas flago se ĝi estas inverse hisita?

Unualoke ni devas distingi ĉu ni troviĝas en paca aŭ en milita etoso. Se ne okazas milito kaj la flago estas inverse hisita, en multaj ŝtatoj tiu ago estas konsiderata kiel ofendo aŭ malestimo de la nacia simbolo. Foje tiu ago estas eĉ leĝe punita, ekz. en Ĉinio hisi inverse la nacian flagon estas konsiderata kiel puninda ago depost la jaro 2020. Ankaŭ en Usono, tie leĝo de la jaro 1923 malpermesas inversigi la flagon, escepte kiam oni deziras montri tujan danĝeron por vivo aŭ propriet-rajto. Tiuj kiuj ŝatas filmojn sendube memoros la televid-serion "Amerika", de la jaro 1987, la intrigo pritraktas sovetan invadon de Usono, tiam ribelantoj kontraŭ tiu invado uzas inversigitan flagon, sendube pro tiu ideo de ekzistanta danĝero kontraŭ la nacio.







Afiŝo kaj sceno de la televid-serio *"Amerika"*, tie aperas la usona flago inversigita.

Lastatempe la inversigo de nacia flago estas uzata okaze de politikaj protestoj, tiel en Kolombio dum la lastaj monatoj politikaj manifestantoj uzas la nacian flagon, inversigita, por protesti kontraŭ la registaro kaj same en Venezuelo kun samaj celoj.

Kaj kion signifas tiu simbolo por armeo aŭ okaze de milito? Vere, oni devas paroli pri du signifoj. Se urbo aŭ fortreso estas konkerata de malamika armeo kaj ili ne disponas pri propra standardo, ili povas hisi inverse la flagon de la fortreso konkerita. Tiel, oni montras, ke en tiu loko jam ne regas la alia armeo. Alia versio de ĉi tiu simbolo sciigas, ke temas pri averto al amikaj venontaj trupoj por indiki, ke okazis ribelo en la fortreso aŭ en la urbo kaj oni bezonas helpon.





Manifestantoj en Kolombio sciigas pri siaj petoj sur inversigita nacia flago.



Tomás Rincón, venezuela futbal-ludisto en Italio protestas kontraŭ tiu sud-amerika registaro.

Tiu estas la intrigo de la usona filmo “The Last Castle” (La Lasta Fortreso) de la jaro 2001. La intrigo prezentas teruran direktoron de milit-malliberejo. Unu el la ĉefaj prizonuloj, eksa generalo ludata de la aktoro Robert Redford, scias, ke la sola rimedo por eksigi la direktoron estas okazigi amasan ribeladon en la prizono. Laŭ konsidero de la usona armeo ribelado ĉe malliberejo sukcesas, se la nacia flago flirtas inversigite, do, la direktoro timas, ke la ĉefa celo de la ribelantoj estas hisi inverse la flagon kaj tiel atingi ties ĉeson. Malgraŭ tiuj timoj la ribelantoj fine ne kuraĝas hisi tiel la flagon, pro la fakto, ke tio ankaŭ signifus malestimi tiun amatan simbolon por kiu ajn soldato.




Afiŝo de la filmo *The Last Castle* (2001)

## *Grava novaĵo por la venonta numero de* ***VENTO***

Kiel vi jam scias VENTO estas publikigaĵo aperanta nur en interreto, la venonta numero aperos dum la monato decembro 2021. Pro la fakto, ke temos pri la 10-a numero de la revuo, la eldonantoj deziras aperigi ne nur interretan version sed ankaŭ tutkoloran libron enhavanta ĉiujn artikolojn de la 10 unuaj numeroj de VENTO, la sola veksilologia revuo en la internacia lingvo Esperanto.

Pro mon-rimedaj aferoj la eldona kvanto ne estos tro granda, pro tio ni deziras antaŭ-scii kiom da homoj estus pretaj akiri tiun publikigotan libron, kies prezo estos inter 20 kaj 30 eŭroj, plus sendo-kostoj se necese. Kiel dirite la enhavo de la libro estos ĉiuj artikoloj aperintaj dum la 10 unuaj numeroj de la revuo.

Do, bv. sciigi pri via preteco akiri tiun libron, aperonta komence de 2022, al la jena adreso: cordoba@esperanto.ac

# Maro kaj Ondoj

*Cristina Bollini (Italio)*

La maro estas ofta elemento sur multaj flagoj, precipe sur la flagoj de insulaj ŝtatoj. Kutime, la maro estas reprezentata per la koloro blua aŭ lazura, uzataj kiel fono de la tuta flago kaj kiel stango (aŭ bendo) lokigita apud la aliaj koloroj.

Sed, ekistas du ŝtatoj kiuj, krom la maro, volis aperigi sur siaj standardoj la ondojn; do, ili adoptis ondo-formajn liniojn anstataŭ la kutimajn rektajn liniojn. Kurioze, tiuj du ŝtatoj troviĝas malproksime unu de la alia, sed, kompreneble, ili ambaŭ estas insulaj ŝtatoj.

Unu el ili estas Kiribato (en Oceanio ĉe la Pacifika oceano), la alia estas la Brita Hind-oceana Teritorio (sude de la ekvatora linio, meze de la Hinda Oceano).



Kiribato



Brita Hindoceana Teritorio

**Kiribato**

La flago de Kiribato (iam konata kiel "Insuloj Gilbert") estis adoptita la 12-an de julio 1979, kiam la teritorio atingis plenan sendependecon de Britio. La flago baziĝas sur desegno de la jaro 1931 fare de Sir Arthur Grimble, kiu estis la Rezidanta Komisaro. Tiuj tri ondoformaj linioj, bluaj kaj blankaj, reprezentas la Pacifikan Oceanon kaj ankaŭ la tri pli grandajn arkipelagojn de la lando (Gilbert, insuloj de la Fenikso kaj la insuloj de la Linio).

Sur la oceano leviĝas la pacifika suno kun 17 radioj, kiuj reprezentas la 16 insulojn de la Gilbert-arkipelago plus la insulon Banaba).

En kelkaj versioj de la flago la radioj estas 21, t.e. la nombro da atoloj nuntempe loĝata. Birdo Fregato (*fregata minor*) ŝvebanta sur ruĝa fono reprezentas la popolon.




**Brita Hindoceana Teritorio**

Kiel aliaj britaj ekskolonioj la elektita flago, uzita por la unua fojo en novembro 1990, estas la tiel dirita *"Union Jack"* (blua flago kie aperas supre mast-angule la flago de Britio).

Sed en ĉi tiu flago la blua fono, kiu reprezentas la maron, estas dividita en 12 ondoformaj linioj, blankaj kaj bluaj, sur kiuj oni vidas simpligitan version de la ŝtata blazono. Sur la blazono aperas palmo, kiu rememorigas la vegetadon de la insulo, sur kiu estas la krono de Sankta Edvardo.




# Britaj koloniaj flagoj en la Mediteranea Maro

*Lukas Toczki*

Meze de la 17-a jarcento Britio sopiris plioftigi la ĉeeston de sia ŝiparo en la Mediteranea Maro, ĉefe kun komercaj celoj. La unua ŝanco por plenumi tiun agadplanon estis la milito okazinta interne de Hispanio inter la jaroj 1704 kaj 1714 pro dinastiaj heredo-rajtoj. Luktis en la Ibera Duoninsulo armeoj de Francio kaj Aŭstrio kaj britaj ŝipoj profitis tiun lukton por apogi la armeon de la aŭstria pretendanto, tamen ilia lasta celo estis establi britajn bazojn en la Meditaraneo.


Do, Britio profitis tiun militon kaj la malforton de Hispanio por konkeri urbon en la sudo de la lando: Ĝibraltaro kaj ankaŭ unu el la insuloj de la Baleara insularo: Menorko. Post kelkaj jaroj Hispanio rekuperis la insulon Menorko, sed ankoraŭ nuntempe Ĝibraltaro estas brita posedaĵo kaj ĉi tiu kolonio enestas la liston de teritorioj ne malkoloniigitaj laŭ Unuiĝintaj Nacioj.

Kiel aliaj britaj dominioj kaj kolonioj **Ĝibraltaro** ekuzis kiel propran flagon bluan standardon kun la brita flago en supra angulo apud la masto. Ene de la flago aperis ankaŭ propra simbolo de la kolonio, ĉi-foje kastelo kun ŝlosilo kaj la latin-lingva moto *"Montis Insignia Calpe"* (Flago de la Monto *Calpe*), ĉar *Calpe* estis la nomo havigita de la romianoj al la Ĝibraltara Rokego. Rilate la insignon de la kastelo kaj la ŝlosilo, ĝi temas pri simbolo donacita de la kastilia reĝino Elisabeto la 1-a en la jaro 1502 al la urbo Ĝibraltaro, kun la senco montri, ke la urbo estas la ŝlosilo de la Ĝibraltara markolo inter la Mediteranea maro kaj la Atlantika oceano.






Ĉi tiu kolonia flago kun blua fono videblis dum multaj jaroj kun alia ruĝa, kiu estis oficiale deklarita en la jaro 1998 kiel civila flago de la kolonio.







Tamen, la nuntempe plej videbla flago de la brita kolonio, ekuzata depost la 6-a jardeko de la pasinta jarcento kaj normaligita en la jaro 1982, estas tre originala, se oni komparas ĝin kun tiuj de aliaj britaj kolonioj. Temas pri du horizontalaj bendoj blanka kaj ruĝa, tiu blanka duobliĝas la larĝecon de la ruĝa bendo. Meze de la blanka bendo aperas la tradicia simbolo de Ĝibraltaro, tio estas, la blazono koncesiita de la kastilia reĝino en la jaro 1502. Sendube temas pri la plej uzata simbolo de la ĝibraltaranoj, anstataŭ tiu de la brita flago.



Flago de Ĝibraltaro



Dokumento de la jaro 1502, tie aperis unuafoje la nuntempa simbolo de Ĝibraltaro

Kiel jam dirite, brita ŝiparo konkeris ankaŭ la insulon **Menorko** komence de la 17-a jardeko, kadre de hispana interna milito pro dinastiaj heredo-rajtoj. Hispanio rekonkeris la insulon en la jaro 1782, do ĉi tiu konkerita teritorio neniam estis laŭtipa brita kolonio kaj kompreneble, ĝi neniam flirtigis propran flagon kiel brita teritorio. Dum tiuj jaroj kiam Menorko estis brita teritorio, la


brita flago flirtanta ĉe ĉi tiu baleara insulo estis jena:




Brita flago kiam ĉi tiu regno okupis la insulon Menorko

En la jaro 1798, kiam Napoleono marŝis en Egiption por ekigi la konkeron de tiu granda teritorio, li decidis halti unue en la insulo **Malto**, meze de la Mediteranea maro. La kavaliroj de la Malta ordeno, suverenoj de la insulo, rajtigis lin, ĉefe pro la fakto, ke Malto ne povus lukti kontraŭ la impona franca armeo. Jam en Malto, Napoleono decidis alpropigi al Francio la insularon, do Malto eniris en la Francan Imperion dum du jaroj. Maltanoj tute ne favoris al tiu invado kaj multaj el ili rifuĝis en fortresoj. Brita ŝiparo alvenis en la insulon por bloki la francajn invadantojn, kiuj en la jaro 1800 kapitulacis. Tiam Malto fariĝis brita protektorato kaj poste kolonio de Granda Britio en la Mediteraneo.

Tuj post la brita konkero la nova administracio ekuzis la antaŭan maltan flagoj, al kiu oni aldonis mast-angule la brita standardo:




Malta flago antaŭ la jaro 1798




Flago de Malto post la konkero de la insularo fare de brita ŝiparo en lukto kontraŭ la Napoleona armeo

La konstruo meze de la 19-a jarcento de la Sueza Kanalo rapidigis la kontaktojn, do la komerco, inter la orientaj britaj kolonioj kaj la metropolo. Tiel, la britaj kolonioj en la Meditaraneo fariĝis ege gravaj por Britio, kompreneble inter ili elstariĝis Malto. Dum tiuj jaroj la flago de la kolonio ŝanĝis:




1875 - 1898




1898 - 1923

Tiuj koloniaj flagoj unuamente aperigis tradician maltan simbolon, la malta kruco, kune kun la koloroj ruĝa kaj blanka de la flago de la Malta Ordeno. En la postaj versioj de la kolonia flago la malta kruco malaperis, do, nur la koloroj ruĝa kaj blanka reprezentas la insularon.




1923 - 1943



1943 - 1964


Dum la dua mond-milito la brita reĝo aljuĝis la Georgan Krucon al la malta popolo, pro ties kuraĝo dum la atakoj ricevitaj de la naziaj trupoj. Tiu insigno aperas en la kolonia flago de Malto depost la jaro 1943 kaj eĉ nuntempe sur la flago de la sendependa Malto.



Flago de la sendependigita Malto
depost la jaro 1964

Ĉe la **Ionia insularo**, apud la greka marbordo, troviĝas sep insuloj. Ĝis la jaro 1797 ili apartenis al la Venecia Respubliko, tamen, post la malapero de ĉi tiu ŝtato en tiu jaro Francio okupis ilin. Post kelkaj jaroj sub turka regado, la insularo denove eniris en la influon de Francio.

En la jaro 1809 britaj ŝipoj detruis francan ŝiparon apud tiu insularo, tiam britoj okupis la ioniajn insulojn. Verdire, por Britio la ioniaj insuloj ne estis tre grava teritorio, ĉar la arkipelago troviĝis fore de la komercaj itineroj en la Mediteranea maro. Do, Britio subskribis en la jaro 1864 akordon kun Francio, Rusio kaj Grekio kun la promeso donaci la insulojn al Grekio kaj tiel plifortigi la ĵus naskintan grekan monarkion.




Flago de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Ioniaj Insuloj

Dum la brita regado de la insularo la teritorio ricevis la nomon Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Ioniaj Insuloj kaj oni uzis tipan britan kolonian flagon. Sur la standardo aperis la venecia leono de Sankta Marko, por indiki la historian originon de la insularo, same ĉirkaŭ la rando de la flago oni uzis la ruĝan koloron, elemento ankaŭ komuna al la venecia flago.


La insulo **Kipro** estis posedaĵo de la Venecia Respubliko ĝis la jaro 1571, poste la insulo pasis al turka suvereneco. Kiel antaŭe dirite, post la konstruo de la Sueza Kanalo meze de la 19-a jarcento Britio bezonis disponi pri teritorioj tra la Mediteranea maro por certigi la komercajn vojojn inter siaj orientaj kolonioj kaj la londona metropolo. Do, Britio subskribis akordon kun Turkio en la jaro 1878, laŭ kiu Turkio cedis la insulon Kipron al Britio, kondiĉe ke Britio apogus la ekspansiemajn pretendojn de Turkio okaze de la Berlina Kongreso, kiam oni reorganizis la politikan strukturon en la Balkana regiono.

Malgraŭ tiu laŭtraktata cedo, Turkio estis la reala posedanto de la insulo, en la insulo nur sidejis Alta Komisiito de la Brita Imperio. Dum tiuj jaroj la flago uzita de la Kipra kolonio estis jena:




Ene de la flago aperas neniu simbolo rilata al la insulo Kipro, nur la literoj C H C, kun la signifo *Cyprus High Commisioner* (Kipra Alta Komisiito).

En la jaro 1914, kadre de la unua mondmilito, Britio aneksis la insulon, tio provokis militon inter Turkio kaj Britio. Tiam oficiale Kipro fariĝis brita kolonio kaj, kompreneble la flago sanĝiĝis, tio okazis en la jaro 1922.




Ĉi tiu flago de la kipra kolonio flirtis ĝis la sendependiĝo de la insulo en la jaro 1960. Por reprezenti Kipron en la flago oni uzis la blazonon de la angla reĝo Rikardo la 1-a, kiu konkeris la insulon Kipron en la jaro 1191 dum la 3-a krucmilito, sur kiu aperas du ruĝaj leonoj.

En la jaro 1960 Kipro sendependiĝis, tamen oni subskribis akordon kaj Britio konservis ĉe si militajn bazojn en la sudo, *Akrotiri* kaj *Dekelia*. Laŭ tiu akordo la bazoj estas brita teritorio. Kvankam en intereto aperas flagoj de tiu bazoj estas necese averti, ke ambaŭ teritorioj oficiale uzas la britan flagon, tute ne alian.


Post la unua mondmilito la Osmanida Imperio malaperis, tiel Turkio perdis siajn tutajn teritoriojn en Arabio, Sirio kaj Jordanio. Britio ricevis kiel mandaton **Palestinon** tio estas Britio regis teritorion nome de la Ligo de Nacioj, provizore la administranta potenco regus la teritorion. La mandato finiĝis en la

en la jaro 1948 per la divido de la palestina teritorio inter judoj kaj araboj.

Verdire, Palestino neniam estis brita kolonio, ĉi tiu ŝtato nur agadis kiel administranto de la teritorio nome de la Ligo de Nacioj. Malgraŭ tio Britio uzis propran kolonian flagon por Palestino, kvankam ĝi ja estis ege simpla:




Teritorioj menciitaj en la artikolo




Iamaj britaj kolonioj tra la Mediteranea maro. Ĝibraltaro nuntempe ankoraŭ restas sub brita suvereneco

# Lastaj Informoj pri Flagoj



## Plaĝaj flagoj por daltonuloj

Ekzistas internacia flag-kodo sciiganta pri la mar-stato. Do, se oni flirtigas verdan flagon, ni povos eniri en la marbordon trankvile; se la flago estas flava, la bano estas permesata sed kun grandaj prizorgoj, tiam la uzo de malgrandaj boatoj ne estas malpermesata. Fine, se la flago flirtanta estas ruĝa, la banado en la plaĝo estas tute malpermesata.

Tamen, ĉu oni pensis pri la daltonuloj kiam oni fiksis ĉi tiun koloran kodon? Tute ne. Daltonuloj suferas heredan anomalion en la perceptado de la koloroj, ĉefe temas pri nekapablo distingi inter la verdo kaj la ruĝo.

Do, io tiel facila kiel vidi flagon por scii ĉu estas permesata aŭ ne la banado en la plaĝo, estas granda problemo por daltonuloj. Cele solvi ĉi tiun problemon en la hispanaj plaĝoj de antaŭ kelkaj jaroj oni uzas samajn kolorajn flagojn (verdan, flavan kaj ruĝan), sed oni aldonas simbolon kiu eblas diskonigi kiamaniere statas la maro.



Tiel, ene de la verda flago aperas diagonala streko apud triangulo kun la pinto montranta la dekstran flankon. Se temas pri la flava flago, ene de ĝi aperas simpla diagonala streko kaj fine, sur la ruĝa flago aperas triangulo montranta kies pinto celas la maldekstran flankon.

## La plej granda flago flirtos en Parizo

La Organiza Komitato de la venontaj Olimpiaj Ludoj, Parizo 2024, deziras superi mondan rekordon per la flirtigo de la plej granda e impona flago en la mondo. Unuamomente tiu flago devus flirti en la Ejfelturo, okaze de la transdono de la olimpika flago al la urbrestrino de Parizo en ceremonio okazinta en Tokio. Bedaŭrinde la tiumomenta vento estis tre forta kaj tio endanĝerigis la sukceso de la flirtigo, do, oni deziris prokrastigi tiun ceremonion. Malgraŭ tio, komputila komponado montris tiun baldaŭan flirtigon.




Oni demandis al prezidanto de la Organiza Komitato de la Parizaj Olimpikaj Ludoj ĉu la elektata flago estos tiu de Francio, de la Olimpiaj Ludoj aŭ de la Organiza Komitato mem, al tiu demando li respondis, ke temas pri surprizo. La flago laŭ mezuro estas simila al futbal-ludejo.

# Aŭstraliaj korbopilk-ludistoj montras siajn flagojn en la Olimpiaj Ludoj

La korbopilka teamo de Aŭstralio atingis bronzan medalon okaze de la pasintaj Olimpiaj Ludoj, Tokio 2020. Post la medal-ceremonio la korbopilkistoj montris jenajn flagojn, la ruĝa-nigra-flava standardo de la aŭstraliaj aborigenoj, tiu oficiala de Aŭstralio kaj sube tiu de la insuloj de la Toresa Markolo.



*Kunlaboru kun ni en la projekto krei fakan asocion*

## VENTO

- Se vi estas esperantisto kaj flag-amanto jen via nova asocio: **VENTO**. Niaj celoj estas pritrakti flagsciencajn temojn kaj disvastigi la internacian lingvon esperanton ĉe veksilologiaj rondoj.
- Niaj nuntempaj streboj estas oficiale fondi la asocion **VENTO** kaj peti nian aliĝon al FIAV (Federacio Internacia de Asocioj Vexilologiaj). Helpu al ni atingi tion.
- Ni petas nenian monan kontribuon, simple, legu la proponitan statuton de **VENTO** kaj anoncu vian partoprenon en tutmonda kunsido de esperantistaj veksilologoj okazonta post kelkaj semajnoj per interreto.

# Birdoj en flagoj

Cristina Bollini (Italio)

La birdoj kiel simbolo, precipe agloj, estas uzataj en multaj emblemoj, sed oni povas vidi ilin sur malmultaj naciaj flagoj. Jen nekompleta listo de la flagoj en kiuj aperas bildoj de malsamaj specoj, escepte agloj, kiu estos la ĉef-temo de alia artikolo.



*Acoroj - Nico*



*Dominiko - Papago Sisseru*

**Insuloj Acoroj** (portugala dependeco) ekde la jaro 1979 rajtas hisi sian flagon, sur kiu, centre, aperas fluganta flava nizo. La nizo rilatas al la portugala nomo de la lando: fakte *Açor* signifas Nizon.

Naŭ flavaj steloj super la nizo reprezentas la insulojn de la arkipelago, dum la koloroj blanko kaj bluo devenas de tiuj utiligitaj de la Liberiga Fronto.

**Dominiko** enmetas en propran verdan flagon (verdo simbolas la vegetadon), krucon flavan-nigran-blankan (kiu reprezentas la Sanktegan Triunuon), sur kiu estas eble vidi papagon *"sisseru"* intere de ruĝa cirklo.

La papago reprezentas la altajn naciajn aspirojn kaj la dek steloj estas la distriktoj de la insulo. La ruĝo simbolas sindevigon kaj socian justecon; flavo estas koloro de la suno, de la agrikulturo kaj de la popolo; nigro simbolas la teron kaj la afrikajn originojn de la nacio. Blanko estas simbolo de pureco kaj, kune kun la papago, de la deziroj de la popolo.



*Gvatemalo - Kecalo*



*Kristnaskinsulo - Fetono blanka vosto*

En la flago de **Gvatemalo**, centre de la blanka bendo, kiu simbolas purecojn kaj valorojn de la nacio situita inter la Pacifika Oceano kaj la Antila Maro (ambaŭ reprezentataj de la bluaj bendoj), aperas birdo Kecalo, simbolo devenanta de la popolo Majao kaj simbolo de libereco. La birdo sin apogas sur pergameno, kie aperas la dato de la sendependiĝo, kiu devas esti ŝirmata ankaŭ de armiloj. La oliva krono reprezentas la pacon.

La flago de **Kristnaskinsulo** (aŭstralia teritorio) memorigas la Pacifikan Oceanon (bluo) kaj la insulon mem (verdo). La birdo estas la *"Phaeton Iepturus"* (Fetono kun blanka vosto), tipa mara birdo kiu simbolas la faŭnon de la teritorio.




*Kiribato - Fregato*



*Papuo Nov-Gvineo - Paradizeo*

La birdo fregato ĉiam estis la simbolo de la Insuloj Gilbert (eksa nomo de **Kiribato**) kaj, ekde la kolonia periodo, tiu birdo aperas sur la nacia flago.

Sur la tradiciaj koloroj nigra kaj ruĝa de **Papuo Nov-Gvineo**, oni povas vidi silueton de *kumul* (paradizeo), kiu reprezentas la plialtiĝon de la nova nacio.



*Sankta Heleno -*
*Karadrio de Sankta Heleno*



*Ugando - Kronita gruo*

La flago de **Sankta Heleno** estas la tradicia *"Blue Ensign",* tio estas, blua fono kun la brita flago en la supera kantono. Sur la blazono de la insulo, kie aperas ŝipo albordiĝanta al la insulo) aperas, sur flava fono, la "karadio de Sankta Heleno", tipa loka birdo, ĝi reprezentas la faŭnon de la insulo.

**Ugando** utiligas la tradiciajn kolorojn de la sendependisma movado, kiu venkis okaze de la voĉdonado de la jaro 1962, aperas ankaŭ la simbolo de kronita gruo. Tiu estas tradicia emblemo de Ugando, uzita de iu el la reĝoj de la teritorio dum la pasinteco, ĝis la konkero de plena sendependeco.

La koloroj nigra, flava kaj ruĝa simbolas respektive la ugandan popolon, la sunon kaj la fratecon.



*Zimbabvo - Stiligita birdo*

La lasta flago de ĉi tiu mallonga trarigardo estas la flago de **Zimbabvo,** sur kiu estas eble vidi stiligitan birdon devenanta de antikvaj ĉizadoj retrovitaj en la urbo *Zimbabvi.* Sub la birdo, la ruĝa kvinpinta stelo reprezentas la socialismon, dum la blanka fono estas simbolo de paco.

Sur du flankoj de la triangulo aperas nigra linio, kiu memorigas la indiĝenan popolon, dum multaj jaroj submetita al koloniantoj.

La uzitaj koloroj estas tiuj de la Afrika Nacia Unuiĝo, partio kiu gvidis la landon ĝis la sendependenco, ili simbolas la agrikulturon (verdo); minejajn rimedojn (flavo) kaj la sangon elverŝitan dum la lukto (ruĝo).

# Veksilologia Kuriozaĵo

La flago de Paragvajo estas la sola nacia flago kies flankoj estas malsimilaj. La malsimilaĵo baziĝas sur la emblemoj aperantaj sur unu kaj alia flanko de la flago.

Sur unu el la flankoj aperas la nacia blazono de Paragvajo, tio estas: flava kvinpinta stelo ĉirkaŭita de verda girlando limigita per la vortoj *"República del Paraguay"* (Respubliko Paragvajo), ĉio ene de du samcentraj cirkloj.






La emblemo sur la dorsoflano estas flava leono sub ruĝa ĉapo kaj la vortoj *"Paz y Justicia"* (Paco kaj Justeco). Same aperas la vortoj *"República del Paraguay"* (Respubliko Paragvajo) ene de du samcentraj cirkloj.





# La fotografaĵo de niaj legantoj



Flago de la dinastio Grimaldo en la Princa Palaco de Montekarlo (Monako).
Dato de la fotografaĵo: aŭgusto 2021.

*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*

*NI ATENDAS VIAJN FOTOGRAFAĴOJN !*

# Kiel enmeti tekston en la Esperanto-flagon

*José M. Rodríguez (Hispanio)*

Flagoj per si mem, kun ties koloroj kaj formoj, reprezentas ideojn, ili esprimas ion. Same, skribado kun la literoj esprimas ideojn per vortoj. Do, flagoj kaj skribado iamaniere estas similaj, ambaŭ esprimas ion. Pro tio, ne estas konvene uzi samtempe tiujn sistemojn, tiel oni devas eviti aperigi vortojn sur flagoj. Temas pri la veksilologia principo: *Ne vortoj sur flagoj.*

Malgraŭ ĉi tiu principo estas eble vidi flagojn kie vortoj kaj eĉ frazoj aperas. Sur kelkaj el ili oni proklamas ideon, jen kelkaj ekzemploj:




Flago de Sauda Arabio kie oni proklamas:
*"Ne ekzistas Dio krom Alaho kaj Mohamedo estas la mesaĝisto de Alaho"*




Flago de Irako kun la jena teksto:
*"Alaho estas la plej granda"*

Ofte oni esprimas ankaŭ celojn aŭ avertojn:




Flago de la usona sendependa movado kontraŭ britaj koloniistoj avertas:
*"Ne pied-premu min"*.




Flago de Brazilo proklamas celon:
*"Ordo kaj Progreso"*

Ankaŭ eblas trovi flagojn kiuj sciigas pri la teritorio kiujn ili reprezentas:




*Flago de la usona ŝtato Kalifornio*





*kaj de Kansaso*

Verdire, skribi la nomon de la teritorio sur la flago reprezentanta ĝin egalas al nuligi la sencon de la ceteraj simboloj de la flago. Tio estas, kial aperigi sur la flago pejzaĝon de Kansaso kaj sun-floron, kiuj ja estas simboloj de tiu usona ŝtato, se samtempe la vorto *"Kansas"* jam sciigas kion indikas tiuj simboloj?


Same, vorto aŭ frazo sur flago ne estas facile videbla el longa distanco. Do, kial aperigi la minancantan frazon *"Ne pied-premu min"*, se long-distance la ebla avertita malamiko ne kapablas legi la frazon?

Kiel dirite, flago ne estas afiŝo. Dum flagoj flirtas, afiŝoj estas senmovaj kaj tio ebligas ties facilan legadon. Jen kialoj pravigantaj la veksilologian principon: *Ne vortoj sur flagoj.*

Tamen, eblas trovi nepran escepton al tiu regulo, tio okazas kiam diversaj grupoj uzas saman flagon kaj estas necese distingi ilin. Ekzemple, dum la ekzisto de Sovet-Unuiĝo, kelkaj teritorioj uzis saman flagon kun la aldono de la nomo de la regiono, jen kelkaj ekzemploj:




Ĉeĉena-Inguŝa Aŭtonoma Soveta Socialisma Respubliko




Karelia Soveta Aŭtonoma Socialisma Respubliko




Burjata Soveta Aŭtonoma Socialisma Respubliko

Kaj se paroli pri la E-flago, ofte sur nia blanka-verda flago aperas surmetigita la nomo de grupo aŭ asocio, jen kelkaj konsiloj por fari tion:

- La loko kie oni devas aperi la nomon de la grupo devas esti la suba-dekstra parto de la flago, kiel eble plej sube, tio estas: la loko pli malproksima al verda stelo, do prefere sub imaga linio sub la blanka kvadrato entenanta la stelon.







- Se oni deziras uzi nur unu lineon por la teksto, preferinde uzi la plej suban parton de la flago laŭlonge:




- Konsilindas la uzo de blanka koloro por la literoj. Tiel, la koloroj de la E-flago daŭre estos verda kaj blanka.

- Rilate la aldonon de simbolo kune kun la literoj, tio estas tute malkonsilinda, ĉar la sola simbolo aperanta sur la E-flago devus esti la stelo mem. Tamen, se oni deziras nepre aperigi simbolon sur la flago, ĝi devus esti lokigita sub la stelo, neniam je la sama nivelo.

- Ne modifu la stelon per aldono de simbolo aŭ literoj ĉirkaŭ ĝi, se tiel, la rezulto ne estus E-flago kun teksto aldonita, sed male alia flago, tiu de la asocio.

- Pri la ĝustizo de la teksto, laŭ elekto de la dezajnisto, tio estas: la teksto povas esti ĝustigita dekstren, maldekstren aŭ centrigita. Tamen, memoru neniam dispartigi la vortojn, do, evitu jenon:




***Ne!***




Flago de Japana Esperanto-Instituto




Flago de Hubei-a Esperanto-Asocio

**Memoru, ke...**

estas eble legi pasintajn numerojn de nia revuo. Vi nur devas viziti jenan TTT- paĝon:

www.esperanto.ac/vento

Aliro kaj legado de revuoj estas **tute senpaga.**



# La angulo de la blazonoj: *Dominika Respubliko*

Sciate, ke sur multaj ŝtataj flagoj aperas la nacia blazono, tamen malofte aperas la nacia flago ene de tiu blazono. Unu el ili estas tiu de la Dominika Respubliko.

Dominika Respubliko, ankaŭ konata en esperanto kiel *Domingo*, estas insula lando en la Kariba Maro. Ĝi troviĝas en la orienta parto de insulo Hispaniolo, tuj apud Haitio. La blazono de la respubliko estis oficiale adoptita okaze de la sendependiĝo en la jaro 1844, kvankam ĝi havis pli ol dudek etajn ŝanĝojn, ĝis la aktuala dezajno.




La blazono, iamaniere, ripetas formojn kaj kolorojn de la nacia flago. Centra blanka kruco, kiel en la standardo, formas kvar rektangulojn, bluajn kaj ruĝajn. Meze de la blazono aperas libro, temas pri Biblio malfermita en la Evangelio de Sankta Johano, ĝuste ĉe la versiklo kiu proklamas: *"kaj vi scios la veron kaj la vero vin liberigos"*. Temas do, pri la sola blazono sur nacia flago, kie aperas Biblio. Sur ĝi aperas alia kristana simbolo: flava kruco. La mencio de Dio ankaŭ kronigas la blazonon per la vortoj: *Dio, Patrlando, Libereco.*




Ses lancoj aperas ĉe la bazo de la kruco, sub la Biblio. Kvar el ili utilas kiel mastoj de kvar naciaj flagoj. Flanke de la blazono aperas, maldekstren, branĉo de laŭr-arbo, kies signifo estas sukceso kaj venko; dekstren, palmo memorigas la eternecon de la dominika nacio. Sube, ruĝa bendo kun oraj literoj sciigas pri la nomo de la nacio: *Dominika Respubliko.*

La unuaj dezajnoj de la blazono baziĝis sur la haitia blazono, kie ankaŭ aperas naciaj flagoj. Sur la unuaj versioj de la blazono de la Dominika Respubliko aperis ankaŭ kanonoj, similaj al tiuj de Haitio, tamen iom post iom la blazono ŝanĝiĝis, la nuntempa versio estas adoptita en la jaro 1913.




Unua versio de la Dominik-Respublika blazono.




Blazono de Haitio

# Flagoj kaj poŝtmarkoj:

## *Poŝtmarkoj por festi la pacon post la Ĉako-milito*




La Ĉako-milito okazis inter la jaroj 1932 kaj 1935 inter la sudamerikaj ŝtatoj Bolivio kaj Paragvajo. Kelkaj jardekoj antaŭe, en 1884, kiam Ĉilio milite venkis Bolivion, ĉi tiu lasta lando perdis sian marbordan regionon en la Pacifika Oceano. Tiam Bolivio klopodis atingi la Atlantikan Oceanon tra la Plata-rivero, ĉi tiu itinero trairis regionon Ĉakon, kiu laŭdire estis riĉa je nafto. Tiu regiono temis pri disputa tereno, kvankam verdire la plejmulto el la enloĝantaro estis paragvaj-devena.




Bolivio konsideris sin pli forta kompare al Paragvajo. La bolivia enloĝantaro estis trioble pli nombra ol tiu de Paragvajo, krome ili disponis pri pli modernaj armiloj, havigitaj de Usono kaj la armeo estis komandita de sperta germano kiu luktis dum la unua mond-milito. Do, en la jaro 1932 la bolivia armeo okupis paragvajajn poziciojn en la nordo de la regiono kaj ili sukcese atakis malgrandan fuorton. Fine de tiu jaro la paragvajaj trupoj reokupis tiun lokon kaj la bolivianoj retiriĝis.

Aliaj malgrandaj fortikigitaj konstruaĵoj suferis atakojn, ĉu de la paragvaja armeo, ĉu de la boliviaj trupoj. Tamen, la paragvajaj soldatoj estis pli bone preparitaj por la batalado en tiu medio, krome multaj boliviaj soldatoj mortis pro malsanoj kaj serpento-mordoj.



Paragvaja soldato antaŭ flago en la Ĉaka regiono

La kombatoj ĉesis en la jaro 1935, kiam la paragvaja armeo eniris en bolivian teritorion kaj boliviaj kontraŭatakoj komprenigis ambaŭ flankojn, ke la plej taŭga solvo estus kundividi la regionon. Do, la interbatalantoj sukcesis armistici en la monato junio 1935, bedaŭrinde dum la milito 200.000 homoj, soldatoj kaj civiluloj, mortis.



Post longdaŭraj konversacioj, aŭspicitaj de najbaraj landoj, la milito finiĝis pere de traktato subskribita en Bonaero (Argentino) en la monato julio de 1938.

La argentina ministro pri eksterlandaj aferoj, S-ro Carlos Saavedra Lamas, organizis la pac-konversaciojn kaj pro tio li ricevis Nobel-Pacpremion.

Bolivia sub-oficiro solene ĵuras fidelecon al sia nacia flago.

Laŭ la pac-akordo Paragvajo atingis la 75% el la teritorio de la Ĉaka regiono, la cetera parto estus por Bolivio kiu ankaŭ rajtis uzi la riveron Paragvajon por atingi la Atlantikan Oceanon pere de la Plat-rivero.

En la jaro 1939, tio estas unu jaro post la subskribo de la pac-akordo, la Paragvaja Poŝta Servo eldonis poŝtmark-serion por celebri la pac-akordon. Tiuj poŝtmarkoj omaĝis la laboron plenumitan de najbaraj ŝtatoj (ankaŭ Usono) por favorigi la konversaciojn pere de kiuj oni atingis la pac-traktaton. Temis pri Peruo, Ĉilio, Argentino, Brazilo, Urugvajo kaj, kiel dirite, ankaŭ Usono. Sur ĉiu poŝtmarko aperis la flago de Paragvajo kune kun tiuj de la ceteraj landoj, ankaŭ aperis la bildo de la ministro pri eksterlandaj aferoj de ĉiu ŝtato. Kurioze, sur tiu de Usono aperis ne la mono kaj vizaĝo de la ministro, sed aglo simbolanta Usonon.

Fine, unu el tiuj poŝtmarkoj estis speciale dediĉita al ambaŭ landoj: Paragvajo kaj Bolivio, meze de ambaŭ flagoj aperis klasika matrono, alegorio de la deziroj pri paco de tiuj popoloj.





















La poŝtmarkoj aperis en la monato novembro de 1939, unu jaro post la subskribo de la pac-akordo. Ili estis eldonitaj de la Paragvaja Poŝta Servo kaj presitaj de la usona *American Bank Note Co.* kompanio kiu tiutempe eldonis ne nur la poŝtmarkojn de Paragvajo, sed ankaŭ ties biletoj.

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

www.esperanto.ac

# *Trovu la eraron !*





Tweet

**Embajada de España en Islandia** @EmbEspIslandia · 8 jun.


Muy interesante entrevista a las profesoras Erla Erlensdóttir y Kristín Gudrun Jónsdóttir, coordinadoras del libro sobre las relaciones 🇪🇸 🇦🇽 a lo largo de la historia. Una obra muy recomendable.


La pasintan 8-an de junio la tvitera paĝo de la Hispana Ambasadejo en Islandio publikigis jenan tekston:

*Hispana Ambasadejo en Islando @EmbEspIslandia - 8a de junio*

*Tre interesa intervjuo al la profesorinoj Erla Erlensdóttir kaj Kristín Gudrun Jónsdóttir, kunordigantoj de libro pri rilatoj* 🇪🇸 🇦🇽 *tra la historio. Tre rekomendinda verko.*


Ĉu vi konstatis, ke ekzistas eraro en la aperigo de la islanda flago? Ja, ŝajnas, ke la Hispana Ambasadejo konfuzis la islandan flagon kun tiu de la insulo Alando.





# Veksilologia Terminaro

## *La Masto*



# Ni daŭre celas fondi la asocion V.E.N.T.O.

## *Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo*

Estimataj,

kiel vi jam scias malgranda skipo de esperantistaj veksilologoj, tio estas: flagamantoj, decidis antaŭ kelke da tempo krei fakan asocion pri ĉi tiu afero. Ties nomo kompreneble estos ***VENTO***, kiu unuamomente povus signifi "*Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo*", tamen nun ĝi temas pri la nomo, sen mallongigoj aŭ akronimoj, de nia baldaŭ asocio.

Pro la fakto ke la revuo publikiĝas en Hispanio, kelkaj tieaj kunlaborantoj kun VENTO decidis redakti statuton kiu, post konsidero de ĉiuj interesitoj, estos registritaj ĉe la hispana administracio. Sed atentu, ne temas pri nacia organizo, ĉar ĝi estos tutmonda, tamen estas necese fondi ĝi sur iu ajn konkreta loko.

Jen la proceduro por leĝigi nian novan asocion kaj ankaŭ jen nia invito al ĉiuj por partopreni kaj ĉefroli en ĝi:

1) Ĉi tie vi povos legi la proponitan statuton. Kiel dirite, temas pri statuto redaktita por esti aprobita en Hispanio, do, eble kelkaj aferoj povas ŝajni fremdaj al iuj. Tamen, memoru, ke oni bezonas registri la asocion sur konkreta lando en la mondo. Ni elektis Hispanion, ĉar la plimulto el la iniciantoj de ĉi tiu asocio estas hispanoj.

2) Se vi deziras modifi, enmeti aŭ forviŝi ion, bv. skribi al jena adreso: cordoba@esperanto.ac kun via propono. Same, se vi konsentas kun la proponita statuto kontaktu kun ni por sciigi, ke vi estas preta kunlabori kun ĉi tiu nova asocio.

3) **Bv. fari tion antaŭ la 30-a de septembro 2021.** Post tiu dato ni informos al ĉiuj interesitoj pri onta interreta renkontiĝo. Tiu akto estos la oficiala unua renkontiĝo por krei VENTO-n.

4) Dum tiu renkontiĝo oni sciigos al ĉiuj pri la sanĝoj proponitaj al la statuto kaj ĉiuj partoprenantoj rajtos voĉdoni.

5) Poste, ni redaktos akton pri la renkontiĝo kaj kune kun la statuto aprobita ni petos al la hispana administracio la registrigon de ***VENTO***.

Do, ne hezitu kunlabori kun ni, **legu la statuton**, sendu viajn opiniojn kaj vian pretecon partopreni en la renkontiĝo al **ĉi tiu ret-adreso**. Ni serĉos taŭgan horon kaj daton por ĉiuj eblaj partoprenantoj en la mondo, **espereble la virtuala renkontiĝo okazos dum la semajnfino 16-a / 17-a de oktobro 2021.**

*Amike Via, la VENTO-skipo.*

## ***Ĉu esperantisto kaj flag-amanto?***

***VENTO estas via asocio***

cordoba@esperanto.ac

# Kiel kunlabori kun *VENTO*

• Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

• Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

• Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

• La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

• Memoru, ke niaj elektronika adreso estas: cordoba@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:

Revuo VENTO
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*VENTO* aperas tri-foje en la jaro (aprilo – aŭgusto – decembro).



# Veksilologia Humuro



Franca Sid-kuseno

15,99 €



Nederlanda Sid-kuseno

9,99 €

**Verdire, mi ne scias kiun el ili aĉeti !**

Notu la adreson de nia revuo: cordoba@esperanto.ac

Antaŭaj numeroj libere legeblas ĉe: www.esperanto.ac/vento

La adreso kaj la TTT-paĝo estis afable havigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. www.esperanto.ac

Artikoloj, kritikoj kaj kiu ajn kunlaboro estos ĉiam bonvenaj.


Dua universala Kongreso
de
ESPERANTO
ĜENEVO
28. Aŭgusto
6. Septembro 1906